

Arthur kaj Heidi Baur kun Claude kaj Andrée Gacond:
Konversacio de la esperanto-parolistoj de SRI (4. Claude Gacond-Arthur Baur)
SRI-123-1-774-1984

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-123/SRI-123-1-774-1984-Arthur-Heidi-Baur-Claude-Andree-Gacond-Konversacio-de-la-esperanto-parolistoj-de-SRI-4.mp3>

AG.- Por la kvara fojo renkontiĝis la kvar kunlaborantoj de la Esperanto-fako de Svisa Radio Internacia por reciproka intervjuado. Hodiaŭ mia edzo, Claude Gacond babilas kun Arthur Baur.

CG.- D-ro Arthur Baur, mia kolego, ni komencis ĉiun intervjuon petante ke oni sin prezentu mem. Do eble vi diru kelkajn vortojn.

AB.- Mi estas naskita en Zürich, en la plej granda urbo de Svislando sed ne la ĉefa urbo. Kaj tie mi pasigis la lernejojn kaj la gimnazion kaj la universitaton, kaj finis miajn studojn doktoriĝante kaj ankaŭ farante la agregacion kiel gimnazia instruisto. Tamen mi poste ne plenumis ĉi tiun profesion, ĉar la ĵurnalismo pli altiris min.

CG.- Mi konstatas tre ofte, ke junuloj, kiuj alvenas al Esperanto interesiĝas pri lingvaj problemoj. Sed ankaŭ ekzistas la inverso, ke tiuj, kiuj interesiĝas pri lingvaj problemoj alvenas al Esperanto. Kio estis via situacio?

AB.- Ĉe mi estas eble la kontraŭo. Hodiaŭ jes oni diras ke mi estas poligloto, kaj mi estas efektive profesia faka lingvisto. Sed mi kredas, ke unue venis Esperanto. Kaj Esperanto montris al mi la interesecon de la tuta problemo. Kaj Esperanto estis la unua fremda lingvo kion mi povis paroli. Ĉar mi ĉiam havis la impreson de lernejo, ke la lingvojn kiujn oni lernas tie oni ne povas paroli, estas multe tro malfacilaj kaj oni faras nenion ol, oni akiras nenion ol ruĝajn korektaĵojn en la kajeroj kaj nur timas. Dum Esperanton mi subite povis paroli en la klubo de Zürich kaj tio faris al mi tiom da plezuro, ke poste mi lernis ankoraŭ diversajn aliajn lingvojn. Libervole.

CG.- Jes. Do, vi komencis lerni Esperanton kiam vi estis ...

AB.- Mi estis 15-jara.

CG.- Kaj do vi elektis la profesion de ĵurnalisto, ĉu ne ? Vi iris en Berno por labori.

AB.- Ne, unue mi estis en malgranda ĵurnalo en la kanton de Zürich. Kaj de tie oni vokis min al Bern en la jaro 1955, pardonu, 45, kaj tie mi estis en berna tagĵurnalo, kie mi restadis ĝis la jaro 1966. Kaj tiam oni venigis min al Winterthur, kie mi devis transpreni la ĉefredaktorecon de sufiĉe granda regiona ĵurnalo, kie mi restadis ĝis mia pensiiĝo.

CG.- Kaj vi revenis al Zürich.

AB.- Tiam mi revenis al Zürich kie mi estas hejma, ĉar mi ankaŭ posedas domon tie, kie mi jam loĝis kun miaj gepatroj.

CG.- Kaj vi ankaŭ redaktoris por Esperanto, ĉu ne ?

AB.- Mi redaktoras, jes, mi eldonas la malgrandan gazeteton. En germana lingvo oni diras ,fromaĝa ĵurnalo‘ kaj en franca lingvo oni diras ,feuille de chou‘.

CG.- ‘Brasikfolio’

AB.- ‘Brasikfolio’, jes. Do, tiun gazeteton mi redaktas efektive ankoraŭ nun. Kaj mi jam dum dek jaroj, inter 1950 kaj 1960 ankaŭ redaktis ĝin.

CG.- Sed, por Esperanto, via ĉefa okupo, kaj tion ni diru, estis por la Esperanto-elsendoj de Svisa Radio Internacia. Se mi ne eraras, kiam ni festos la jubileon 100-jaran de Esperanto, por vi estos la festado de 40 jaroj de laboro por Esperanto ĉe Svisa Radio Internacia.

AB.- Efektive.

CG.- Eble vi rakontu kiel komenciĝis tiu aventuro.

AB.- Tiu aventuro komenciĝis, unue oni devas diri, dank’ al Edmond Privat, ĉar dank’ al li, Esperanto estis tiam jam enkondukita. Sed en la jaro 1947 do okazis esperanta Universala Kongreso en Bern. Kaj tiam oni donis al mi, sen ke mi mem demandis tion, tio venis subite kvazaŭ el la ĉielo, oni demandis min ĉu mi ne povus fari ĉiutage elsendon dum la kongreso. Kaj mi tre volonte faris tion. Kaj oni donis al mi dek minutojn ĉiutage. Bedaŭrinde oni ne povis sufiĉe frue anonci tion en la esperanta gazetaro, sed tamen multaj homoj aŭskultis tion kaj ili reagis kaj skribis. Kaj dank’ al tio poste estis enkondukita la dua esperanto-elsendo. La unua estis tiu de Edmond Privat, kiu daŭris ankoraŭ longe, kaj la duan mi do transprenis kaj tiam mi ne pensis, ke tio plenigos kvazaŭ mian tutan vivon.

CG.- Kaj malhelpis vin malsaniĝi, ĉu ne? Oni ne rajtas malsaniĝi, ĉar ĉiusemajne ni devas prelegi. Almenaŭ mi pensas, ke ...

HB.- ...aŭ la edzino prelegas

CG.- ...jes, ĝuste. Kelkfoje li rajtas gripiĝi, ĉu ne? Aŭ ĉu estas ĉar li foriras, estas tro okupita, mi ne scias. Kiel vi kunlaboras?

AB.- Precipe mia edzino legas prelegojn, kiujn mi verkis, sed ankaŭ ŝi mem jam ofte verkis elsendojn mem, originalajn tekstojn, kiujn ŝi skribis, verkis kaj poste legis. Kaj kelkajn fojojn tamen mi estis ja ankaŭ malsana kaj tiam ŝi anstataŭis min.

CG.- Kaj nun vi estas en la ideala periodo de la vivo, bonfarta kaj emerita, ĉu ne? Vi dediĉas ĝin parte al vojaĝoj, se mi ne eraras.

AB.- Jes, tio dependas iom de eksteraj cirkonstancoj. Ĉar mia ĉefa laboro nuntempe estas lingvistiko. Mi faras lingvajn studojn plu kaj mi ankaŭ verkas. Lastan jaron mi eldonis libron pri la svisgermana lingvo. Kaj mi estas nun meditanta pri alia libro, kion mi ankoraŭ ne volas malkaŝi, sed ĉiukaze tio estas mia ĉefa okupo kaj Esperanto estas kromokupo, kiu kelkfoje fariĝas plenokupo. Tio dependas de la cirkonstancoj.

CG.- Kaj vi vizitis plurajn kongresojn, sed ofte kiel aktivulo, ĉefe kiam ili okazis en Svislando, ĝuste por la radio.

AB.- Ĝuste! En Svislando ja okazis tri kongresoj dum mia vivo: en Bern (1939 kaj 1947) kaj Lucerno (1979). Kaj ĉiufoje mi estis tielnomata gazetara ĉefo, do mi estis okupita pri la informa fako. Kaj en la dua kongreso de Bern, kiel mi jam diris, kaj en tiu de Lucerno denove, mi povis fari ĉiutage radioelsendojn.

CG.- Se mi ne eraras, vi iel kunlaboris en la skolo budapeŝta, ni diru de Literatura Mondo.

AB.- Jes, mi havis la plezuron kaj privilegion ke mi ankoraŭ konis persone sinjorojn Baghy kaj Kalocsay, kaj precipe Vilmos Bleyer, kiun mi renkontis en Budapeŝt post la postkongreso post la kongreso en Vieno en 1936, kaj tiam ni priparolis kune la planon eldoni svisan antologion en Esperanto. Kaj tiu plano efektiviĝis, mi ankoraŭ nun miras pri tio. Kaj hodiaŭ oni ja ne plu povus eldoni tian libron je tia prezo, kiel tiam. En tiu rilato la premisoj estis pli bonaj ol nun. Kaj tiuj rilatoj bedaŭrinde estis rompita de la milito.

CG.- Kaj nun, baldaŭ kvindek jaroj, ĉu ne, okazis ekde tiu eldono, sed en via libro ‘La fenomeno Svislando’ vi denove iom raportis pri la diversaj literaturoj de Svislando, ĉu ne?

AB.- Jes, tion mi faris. Efektive mi iomete rigardas tiun libron ‘La fenomeno Svislando’, kiel kvazaŭ esencon de la radioelsendoj, kiujn mi faras, ĉar mi ja ĉiam dediĉas ilin al Svislando. Kaj jam ofte oni demandis min, ĉu vi ne povus eldoni tiujn elsendojn en libro, kaj mi ĉiam devas diri: ne. Tion oni ne povas, ili estas verkitaj cele kaj ankaŭ dependas de aktualeco. Tio ne valoras. Sed se mi ĉion povus kompresi kvazaŭ en unu libro, tio estus ebleco. Kaj tion mi povis fari dank’ al tio, ke la kongreso estis en 1979 kaj tiam ni havis la necesan subtenon por eldoni tiun libron.

CG.- Lasta demando antaŭ nia forpaso de la mondoj estas: vi estas unu el la malmultaj membroj de la nacia komisiono, do svisa nacia komisiono por Unesko, ĉu ne ?

AB.- Jes, tio estas unu el miaj flankaj taskoj. Sed mi devas konfesi ke tiu komisiono nuntempe ne laboras tre bone, ĉar vi eble scias, la tuta situacio de Unesko nun estas malfacila. Kaj tion oni sentas ankaŭ en la naciaj komisionoj, kiuj havas certan malkontentecon pri la evoluo en Parizo, kaj nun la ekzisto de Usono, kion ni malaprobis, sed kio havas influon senteban ankaŭ ĉe ni.

AG.- Vi aŭdis la lastan el la kvar intervjuoj, kiujn reciproke faris la kvar esperanto-parolistoj de Svisa Radio Internacia. Ĝis reaŭdo!